

Konversacio kun Martin Morris

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1990

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo90-18/SRI-1990-18-A-3-Claude-Gacond-Konversacio-kun-Martin-Morris.mp3>

Cl.- Vi aŭdas elsendon de Svisa Radio Internacia. Hodiaŭ Claude Gacond parolas kun Martin Morris, juna brito, vivanta en Londono, kiu staĝis en La Chaux-de-Fonds dum pluraj semajnoj kaj apud la manlaboro: pretigi litojn por la gastoj, telerlavadi, ktp., li ricevis taskon tajpi interalie la verketon de Privat en nova vestaĵo, la esperanto-vestaĵo, do, Libero doktrina kaj sincero.

Martin Morris, vi troviĝis antaŭ tiu laboro, vi troviĝis antaŭ manuskripto ne tute kontentiga, verko de komencanto en tradukarto, kiel vi agis, por, ni diru, iom ĝin vere esperantigi ?

MM.- Nu, kiam mi estis traleganta, mi trovis, ke ĝenerale la gramatika flanko estis ja tre bona kaj mi sentis, ke la tradukinto ja almenaŭ en la parolo povus esti sufiĉe bona. Sed, dum mi estis leganta, mi trovis ke jes ja, evidente la tradukinto estis franclingvano kaj troviĝis sufiĉe multaj francismoj, stranga vortordo kaj tie plu. Supozeble por franco aŭ por iu ajn, tradukado el la nacia lingvo en Esperanton estus ja malfacila afero kaj mi supozas, ke nacilingvaĵoj estas preskaŭ tute ne eviteblaj entute, kaj pro tio oni bezonas homon, kiu parolas alian lingvon denaske por trairi la tekston kaj elŝiri la strangaĵojn kaj la de tempo al tempo ridigajn francismojn, ktp.

Cl.- Do ĝuste, tie montriĝas tre grava laboro kaj tro ofte por multaj tradukoj la tipo mem estas ĝenerale la turismaj prospektoj. Estas nur la samlingvano kiu esperantigas ĝin kaj mankas tiu etapo de alilingvulo, kiu, ni diru, alportas la necesajn korektojn. Por la verko de Privat la tria etapo estos tutcerte fakulo pri Privat mem, el tute alia lingvo. Verŝajne estos s-ro Tomasz Chmielik, kiu relegos la tuton kaj 'Privatigos' la tekston, ĉu ne? Ĉar ĝuste vi ne estis leganto de Privat, do vi simple esperantigis, ni diru, definitive, tiun tekston. Kaj mi devas diri, sufiĉe kontentige. Tio montras ankaŭ ke nun la junaj homoj, kiuj alvenas ofte bone regas la lingvon. Martin Morris, ĉu vi povas doni ekzemplon de frazo, kiun vi devis iom ŝanĝi, aliigi, esperantigi ?

MM.- Mi havas tute belan francismon, kiu troviĝis en la teksto. Kaj la frazo estis : 'Oni ne povas kompreni la strangajn ĵaluzajn sentojn, kiuj foje esprimiĝas pro ŝildoj' kaj tio en la komenco tute ne estis komprenebla por mi, ĝis mi trovis ke la originalo estis 'étiquette'.

Cl.- Jes, jes...

MM.- Do, simple iu miksiĝo inter du vortoj, kiu faris la tekston ne komprenebla. Do, la frazo fakte estas : 'kiuj foje esprimiĝas pro etikedo', kaj kelkaj tiaj miksiĝoj inter vortoj troviĝas kaj tio estas ...

Cl.- Ĉi tie ni povas analizi problemon de la lingvoscio. Oni ĝenerale projekcias al Esperanto la signifon de unu vorto nacilingva. Do, kiam oni tradukas, oni uzas la esperantan vorton, kredante, ke ĝi havas saman signifon. Sed la semantiko estas tre malsimila kaj ĝuste estos tre interese prezenti nun eĉ vian korektitan dokumenton sub formo de prelego unu vesperon en la

Centro de La Chaux-de-Fonds, kaj vidi la reagon de la publiko, ĉiam dirante, 'se vi ne komprenas, interrompu', kaj tiam ni ankaŭ trovos la etiketojn aŭ la vortojn, ni diru, kiun franclingvanoj kaj angloparolantoj kune havas kaj eble polo absolute nenion komprenas.

MM.- Absolute, tio estas necesa afero, ĉu ne. Se eĉ estas prelego tie.

Cl.- En tiu laboro, do vi faris tiun laboron, kio estis via reago al la penso mem de Privat ?

MM.- Li estas tre interesa homo kaj li evidente tre multe pensis pri sia religia opinio, ktp., kaj li evidente tute ne volis esti katenata de la jama religio, la eklezio ktp. Kaj li evidente estas homo, kiu vere volas liberiĝi de ĉiaj diservordoj kaj tiel plu. Kaj li fakte, dum mi estis leganta tion ĉi kaj re-tradukanta, preskaŭ, mi ja trovis multajn ekzemplojn, tiujn, la ses tezojn, kiuj troviĝas, kiuj jam montras, ke li tute libere volas pensi pri la religio ktp. Kaj li ofte donas ekzemplojn, ke ekzemple li sentis sin katenita kaj malsincera kiam li estis en diservo kaj li estis dirante la kredkonfeson kaj li trovis ke li tute ne kredis duonon de tiu konfeso. Kaj tio montriĝas en la teksto ke li vere preskaŭ formis jam propran religion, ĉu ne, en kvakerismo. Li estis ja tre libera kvakero, ĉu ne ?

Cl.- Jes. Do estas interese travivi tiel la vojon de homo jam, ni diru preskaŭ historia evoluo, ĉu ne, ĉar verŝajne nun tiu dokumento ne estos tre revolucia por multaj homoj, sed en la, ni diru, antaŭ militaj periodoj,

MM.-tio ĉi estas en 1940.

Cl.- Jes, sed estas, ni diru pensevoluo de la periodoj, de la jaroj tridekaj, tiam oni povas diri, ke por multaj ĝi estis tre revolucia sinteno. Interalie verŝajne tiun larĝigon de la kristanismo al universaleco, ke ekzemple kun Gandhi li sentas sin absolute sampensanto.

MM.- Alia afero kiun mi rimarkas estas ke li ne nur el kristanismo ĉerpis sian ideon, oni mencias la ĉinan religion kaj tao kaj hindan pensmanieron kaj tiel plku. Do estas sufiĉe refreŝiga, fakte.

Cl.- Do, dum vi faris tiun laboron, vi povis interesiĝi pri la penso de homo, kiu estis je la fino de sia vivo, fakte, je la jaroj tridekaj, baldaŭ la emeritiĝo alvenos, li eniros la Universitaton de Neuchâtel, kie li ankoraŭ instruis dekduon da jaroj, persone mi ekkonatiĝis tiam kun Privat, mi estis tre tre juna kaj mi promenis multe borde de la lago dum miaj gimnaziaj jaroj, mi helpis lin, li lamis. Privat estis kripla, kaj li malfacile povis entramiĝi kaj mi puŝis lin en la tramon. Mi helpis lin eliri el la tramo kaj ofte dum tiuj promenadoj li parolis al mi pri tiuj pensoj, kaj mi estis iom influita tutcerte. Mi estis jam liberiĝinta de la kredoj oficialaj, kiel multaj junuloj nun. Mi sentis, ke li estis., por li tiu liberiĝo estis pli malfacila en la epoko de lia juneco.

MM.- Nuntempe multaj junuloj ribelas kontraŭ la eklezio, ĉar ni simple volas liberiĝi, ĉu ne ?

Cl.- Sed kelkaj revenas, kaj eble tiaj verkoj povos helpi ilin reveni, sed kun pli da objektiveco ol simple refali en fermitan kredadon...

MM.- Ĝi multe pensigis min pri diversaj miaj opinioj, ktp, ankaŭ. Jes.

Cl.- Do tiu staĝo samtempe estis staĝo iomete religia por vi, ĉu ne ?

MM.- Inter la telerlavado ktp., jes.

Cl.- Mi profitas ankaŭ diri, ke junuloj interesataj foje veni kaj labori povas sin proponi kelkfoje kaj ni ekzamenas iliajn kapablojn. Ili devas bone regi la lingvon, ni ne plu volas tro da komencantoj, ĉar ni ne plu havas tro da pjoĉa laboro kaj tiam ili povas plenumi kelkfoje tre originalan aktivecon, ĉefe kiel vi, kiu bone tajpis, ĉu ne ?

Ĉu konklude vi havas ion por diri pri tiaj staĝoj ?

MM.- Nu, sendube, jes. Kiel vi scias, ni multe diskutis pri gramatikaĵoj kaj tiel plu. Kaj mi sentas ke se junuloj povas veni al KCE ekzemple, ili ja povas multe progresi kaj pensi pri gramatikaj aferoj krom religiaj aferoj, ĉu ne ?

Cl.- Ĝuste, kun homoj, kiuj estas el plej diversaj medioj lingvaj kaj tie estas vera internaciismo.

MM.- Kaj oni vere povas evoluigi sian lingvan nivelon, ktp. Jes, estas tre bona afero.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude Gacond parolis kun Martin Morris, juna staĝulo, fakte, universitatulo, kio estas en kemia fako, jam post unu jaro en la universitato, sed eĉ ne estas dudek jaraĝa, ĉu ne ?

MM.- Ankoraŭ ne.

Cl.- Do, unu el la esperoj de la esperanto-socio, ĉu ne.
Mi diras al vi : Ĝis reaŭdo!